



10(116)
2009

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO
Adreso por korespondi: ul. I.Krasickiego 18-20, PL 31-515 Kraków

Krystyna Konecka

La pomo

Pomduonoj diversaj superbaj
apartenas ni al ni hazarde.
Unu ene stampita fajrarde,
alia rara nobla kaj acerba.

En azilo nia edenarbo
ŝirmas branĉon de l'korsentimento.
Ni krepuske, ambaŭ sen prudento
papilojn invitas al varmo.

Estas ankaŭ la hejmgrila skerco,
nigra kato por komponi versojn
kaj hirundoj kun nestoj en niĉo

La simbolo de para feliĉo.
Du partoj dum nokto jam dorma
sopirante unu pomon formas.

Zbigniew Ślącza

La duonlitra tago

al mia amiko Borys, kiu volis
havi versaĵon kun rimo, ritmo kaj pri si.

La duonlitra tago post lito- forlaso
tremadis kvazaŭ nokte ĝi trinkus en "Aso"

Ĝi larĝe ekoscedis kaj griza nebulo
triste envolvis l'urbon post ĉiu angulo,

kaj ĝi iris tra l'stratoj kiel marŝ' funebra,
pendigis sur fenestroj pluv- nubojn tenebrajn,

arojn homajn kunkudris per atend-fadeno,
gvidis ilin demone post si de mateno.

Finfine enu- reton ĝi daŭrigis svingi
kaj mem en ĝin enfalis kaj foriris drinki.

tradukis Lidia Ligeza

Jabłko

NaleŜymy do siebie z przypadku.
Dwie połówki jabłka różnych odmian.
Jedna z piętnem podskórnego ognia,
druga cierpka szlachetna i rzadka.

Rajskie drzewo naszego azylu
chroni kruchą gałązkę czułości.
Więc my sami co zmierzch z ostrożnością
zapraszamy w krąg ciepła motyle.

Jest też świerszcza domowego scherzo,
czarna kotka do pisania wierszy
i jaskółcze gniazda przy framugach

Symbol szczęścia. I noc bywa długa
a w jej wnętrzu dwie połówki senne
jednym jabłkiem i gniazdem nasiennym.

Dzień półlitrowy

przyjacielowi Borysowi, który
chciał mieć wiersz z rymem, z rytmem i o sobie.

Dzień wstał dziś półlitrowy. Gdzieś za miastem zwlókł się
z pościeli, jak po nocy niedopitej w "Luxie".

Ziewnął przeciągle i wtem mgieł opary sine
wzięty miasto w opiekę swych ponurych skrzydeł.

Potem szedł ulicami jak kondukt ponury
i rozwieszał na oknach rozdeszczone chmury.

Ludzi w grupki pozlepiął, zszył niemi czekania
i wodził ich za sobą, jak diabeł od rana.

Wreszcie w poprzek rozwiesił nudy srebrne nici
- i sam się w nie zaplątał, i poszedł, i spił się.

Ambaŭ poemojn oni aperigis en "Podlańia Antologio" eldonita decembre 2009 de Książnica Podlaska en Bjalistoko kaj Akademio Literatura de Esperanto. 240-paĝan libron faritan laŭ iniciato kaj elekto de direktoro Jan Leończuk, tajpis eldonejo "Hejme" de Kazimierz Leja. Poemojn de podlańiaj aŭtoroj tradukis de la pola, ukraina, bjelorusa kaj litova Tomasz Chmielik, István Ertl kaj Lidia Ligeza. Antaŭparolon skribis Dariusz Kulesza.

Kulturo kaj literaturo dum 94-a Universala Kongreso de Esperanto Bjalistoko, 25.07 - 01.08. 2009

Kiel kutime ne eblis partopreni ĉiujn programerojn de la kongreso, ĉar samtempe okazadis 5-6 aranĝojn – en granda tendo, en kafejo "Fama" kaj en lokaloj de la Bjalistoka Politekniko. Mi deziras substreki, ke kvankam neniu el gekrakovanoj apartenis al la loka komitato – kontribuo de nia urbo estis rimarkebla kaj menciinda. Dro Włodzimierz Opoka aktivis dum medicinistaj programeroj, dro Bronisław Kieres valore prelegis pri problemoj de juro, kantistino Irena Urbańska estis pritaksita de aŭskultantaro kiel la unua damo inter kantantaj dum la kongreso virinoj, Magdalena Tatara interese esperantlingve gvidis lecionojn de pola lingvo por eksterlandanoj. Mi mem tradukis tekstojn de kantoj por bjalistoka ensemblo de J. Tomzik kaj elektis tekstojn de William Auld por la Bjalistoka Filharmonio; apoge de ili ekestis tre interesa kant-elpaŝo de solistoj kaj koruso. Unu el programeroj en ciklo "Prelegoj pri Pollando" estis mia prelego "Pasintaj kaj nuntempaj polaj kutimoj". Tomasz Chmielik, István Ertl kaj mi en Książnica Podlaska prezentis kurtan kurson de la esperanta literaturo. Tia programero aperis dum la kongreso unuan fojon kaj ne sen duboj de la respondeculoj pri kulturaj aranĝoj. Sed ni efike defendis nian pripenson kaj rezulte oni invitis nin al Italio por prezenti aŭguste 2010 similan elpaŝon dum la landa kongreso.

Okazis ankaŭ renkonto deducita al libro "Vivo de Lidia Zamenhof", kiun mi tradukis polen. Venis la zamenhofa familio kaj precipe grupo de reprezentantoj de la kredo Bahai. La renkonton gvidis Zbigniew Galor, tradukante laŭ la bezono esperanten aŭ polen demandojn de la partoprenantoj kaj respondojn de Agnieszka Szopińska (edukado de malgranda Lidia fare de la fama patro, mondkoncepto de la heroino) kaj de mi (lingvaj kaj sociaj problemoj). La scenejon ornamis krom kandeloj granda reproduktaĵo de la kovrilo farita laŭ unu el fotoj de Lidia - verko de krakowa artisto Andrzej Kołpanowicz, kiu tre plaĉis. Krakovanino Grażyna Porada ankaŭ meritas multe de agnosko kaj danko. Sen ŝia laboro pere de komputilo ĉi-libro ne povus aperi.

Ne loĝanta en Krakovo ano de nia societo, Kazimierz Leja tajpis la kongresan libron kaj negrandan libreton de Jakobo Ŝapiro "Babiladoj de bonhumora zamenhofano", kiu okupis la unuan lokon sur listo de libroj venditaj de UEA. Ĝi eĉ mankis sur la librostando.

El 26, do tre granda nombro de artaj programeroj, mi sukcesis partopreni nur en tiuj, pri kiuj mi skribas. Grandioza koncerto de Irena Urbańska "Kantoj de juda ŝtetlo" estas plenumita kun bonega multinstrumenta akompano de Lesław Lic. La artistoj prezentis 20 tradiciajn judajn kantojn en jido kaj Esperanto. Aplauĉoj venis ankaŭ pro bonega traduko de kvar kantoj de Gebirtig farita de Mikaelo Bronŝtejn, kaj pro mia "Rebeka". Eĉ tre postulemaj geaŭskultantoj povis esti plene kontentaj, do la artistoj ricevis invitojn koncerti en Italio kaj Pollando.

Al ŝatantoj de la klezmera muziko devis plaĉi bjalistoka grupo de junaj muzikistoj "Chanajki Klezmer Band". Ĉiuj anoj de ĝi estas post fakaj studoj kompletigitaj per laboro kun mondfamaj klezmeroj de diversaj nacioj. En ilia prezento oni aŭdas multetnecon – motivojn lokajn, rusajn, balkanajn kaj belorusajn. Brile muzikis: Rafał Grabowski (akordiono), Radosław Koper (aldo, violono), Rafał Makowski (kontrabaso), Alicja Grabowska (kanto) kaj Maciej Dziemski (perkutito).

Precipan travivaĵon fondis al ni Orkestro kaj Koruso de la Podlaĥia Operejo kaj Filharmonio en Bjalistoko sub gvido de Marcin Nałęcz -Niesiołowski. La artistoj plenumis Finalon de la 9-a Simfonio d-moll op.125 de Ludwig van Beethoven aŭ Odon al la ĝojo. Aparta parto de la vera, multpersona spektaklo konsistis el elektitaj de mi versaĵoj de eminenta, skota poeto esperantista William Auld: "Vi estas maro", "Geedzoj", "Memoro", "Velkoj", "Mia filino trijara", "Mia filino dektrijara" "Ebrio". Ĉi tekstojn provizis en muzikon juna, ukraina komponisto Maksim Fedorov. La ovacion elvokis plenumita verve kaj kun sufiĉa sento de humuro "Ebrio". Ĉi koncerton oni povas aŭskulti per interreto.

Ŝatataj kantistoj Ĵomart kaj Nataŝa elpaŝis dum la kongreso kun filino Karina. La familio devenas de Kazahio, loĝas en Stokholmo. Iliaj kantoj kun vortoj de Ĵomart faras lirikan, ofte

melankolian ligan kun aŭskultantoj, kion plifortigas gitaro kaj bekfluto. Vere valoris aŭdi tiun agordan, belmelodian prezentadon.

Distingita de pola ministro pri kulturo kaj de bjalistoka urbestro la plej konata grupo de moderna danco en Pollando "Fair Play Crew" devenas el Bjalistoko. Ses dancistinoj scipovas kun siaj korpoj fari nekredablajn evoluojn. Oni povas mediti, ĉu tiuj majstrinoj estas ankoraŭ dancistinoj aŭ jam cirkartistinoj. Gardante la grupan harmonion ili tamen prezentas sin kiel apartaj personecoj proponantaj propran, unikajn stilon de dancado.

Monodrama spektaklo de Jerzy Handzlik "Ludoviko Lazaro" preparita speciale por Bjalistoko interese, kvankam tro longe montris ĝismortan fascinon de la Majstro, naskiĝon de Esperanto kaj multfazan interrilaton de la aŭtoro kun la propra verko en solenaj kaj tute bagatelaj epizodoj. Reĝisoris ĝin Kuba Abrahamowicz, ludis Jerzy Handzlik, ankaŭ ano de KSE.

Teatraĵon de Sławomir Mrożek "Domo sur la landlimo" esperantigis Jerzy Handzlik kaj faris tion bonege. Perverse kaj groteske, kiel kutime, Mrożek respeguligis prolemon de ĉiuj landlimoj ne respektantaj bezonojn de unuopulo kaj de ĉiuj sociaj grupoj. – Iu familio iun tagon ekscias, ke meze de ĝia domo oni fiksas landlimon. Alkondukita al absurdo historio rigardas nin per farsaj situacioj sed... la nova ordo draste seriozigas nian pensmanieron, kiam unu el heroinoj estis mortpafita volante preni ion de la propra ŝranko. La ideo de la spektaklo bone korespondas kun interna ideo de Esperanto, kiu proponas la mondon sen limoj kaj limigoj. La teatraĵo prezentas realecon, kiu laŭ Mrożek estas tre fora de tiu idealo. La spektaklon ludis la bjalistoka teatro, reĝisoris ĝin Piotr Dąbrowski. Oni devas agnoski kaj admiri lingvon de prezento plenumita ja de neesperantistoj, kio estas merito de la tradukanto helpanta al la reĝisoro.

"Postnikov - scenoj el la vivo" igis tremon de ĉiu sentema spektanto. La dramo estas apogita je libro de Mikaelo Bronŝtein "Dek tagoj de kapitano Postnikov" eldonita en 2004 j. Recenzis ĝin preskaŭ ĉiuj esperantaj revuoj. La ĉefa figuro de libro kaj de spektaklo kuraĝa, sindonema, honesta kaj nobla Aleksander Postnikov, la unua prezidanto de sovetunia esperanta organizaĵo post bolantaj ĉirkaŭ li eventoj ne hezitis fordoni la vivon por Esperanto pro agado ne tia, kiun povis atendi la reĝimo. La spektaklon preparis la aŭtoro mem kaj ensemblo de la serba teatro Ŝelter. Kiel ĉefrolulo grandioze elpasis konata esperanta aktoro, kroato, Saša Pilipović.

Ni ŝuldas dankon kaj estimon al ĉiuj organizantoj de tiu eminenta aranĝo, kiu pruvis, ke la esperantistaro krom distro bezonas pli profundan spiritan vivon.

Lidia Ligeza

Kion ni scias pri la natura, korka ŝtopilo

La korkokverko (*Quercus suber*) estas mezgrandeca, tutjare verda arbo. La plej valoraj korkokverkaj arbaroj kreskas en sovaĝa naturo ĉe la marbordo de Atlantika Oceano en Portugalio, kie ili ampleksas pli ol 730 mil hektaroj. La dua riĉa tereno de korkokverko estas marbaseno de Mediteraneo, ĉefe en Hispanio, Francio, Italio kaj en nordokcidentaj afrikaj landoj- Alĝerio, Maroko, Tunizio. Tiu ĉi arbospecio postulas humidecon kaj modere varman temperaturon. Kiam kondiĉoj estas favoraj, ĝi kreskas ĝis 20 m alte kaj vivas ĝis 200 jarojn. Dum ĉi tiu tempo oni povas senŝeligi ĝin ĉirkaŭ 15 foje. Oni forprenas la ŝelon de la arbo por produkti korkon, kiu poste utilos por fabriki botelŝtopiloj, krom tio por izoliga materialo, konstruado, dekoracio, ktp. Krome, la frukto estas uzata por bredi brutojn, ĉefe por porkoj, ekzemple en Hispanio kaj Portugalio. La unuan senŝeligon oni povas fari kiam arbo havas 70 cm de diametro kaj 130 cm de alteco. Tamen la unua pulpo ne taŭgas por produkti de botelŝtopiloj. El ĝi oni povas fari aliajn utilaĵojn, kiel izolajn tabulojn, korkan galanterion, plandumojn ktp. Nur la tria senŝeligo, kiam kverko havas ĉirkaŭ 40 jarojn, la korko por botelŝtopiloj estas vere bona. Okazis, ke arbaroj atakis nociva fungo kaj pro tio la korka pulpo ŝimfeteris, do la portugala konsorcio "Amorim Corticeira" investis grandan kapitalon por sciencaj esploradoj kaj perfektigado de krudmaterialo. La plej efika metodo por kontraŭbatali

la fungon estas kelkhora ensorbiĝo de korko per vaporo. La familia konsorcio "Amorim Corticeira" ekzistas de 1870 kaj estas la plej granda produktisto de korko en la mondo. La plej gravaj produktistoj de vino el diversaj landoj subtenas portugalan konsorcion en esploraj laboroj. Ili ŝirmas sian vinon kontraŭ kapsuloj kaj sintetikaj korkoj. La plej grava kvalito de natura korko estas, ke ĝi en la ĝusta kvanto kaj bezono tralastas aeron – kaj vino "spiradas". Kontraŭe, sintetika korko tro multe enlasas aeron – kaj vino oksidiĝas. Vera, natura korko havas multege da kvalitoj: estas senodora, nebrulebla, malpeza, elasta, tralastas nek varmon, nek tremon. Unuan fojon botelŝtopilojn por vino el korko uzis franca monaĥo – vinisto Pierre Pérignon en XVII j. En XVIII j. la korko al botelvino estis jam en Eŭropo ĝenerale uzebla. En la Ekstrema Oriento, Ĉinio, Manĉurio, kaj Koreio elpaŝas ankaŭ korkokverko al kiu apartenas 9 specioj de arboj. Ili ankaŭ kreskas ĝis 20 m, havas tre dikan pulpon kaj posedas 2 trunkojn. La plej rezista kontraŭ severaj kondiĉoj de atmosfero estas amura korkokverko vegetanta en la orienta Siberio kaj en Sakalino. Ĝia ligno estas hela, tre altvalora por meblaro kaj por korkoj al fiŝkaptado. Bedaŭrinde, ke naturan, veran korkon al botelvino, postulantan tiom multe da laboro, ofte belege ornamitan, ni forĵetas al balaaja korbo...

Johana el Nigra Vilaĝo

Vojaĝo al Bornholm (2)

Virino estas la plej grava por familia rondo. Viro estas malforta pro streĉiĝo kaj fakte malrezistema. Sufiĉe oftaj estas memmortigoj. Danlando havas duan lokon en Eŭropo se temas pri memmortigoj.

Tro rapida vojaĝo en la urboj kaj vilaĝoj (pli ol 50 km/h) estas punata. Laŭ pola valuto ĉirkaŭ kelkcent zlotojn. En la insulo por ŝoforo estas permesita unu biero.

Oni opinias kutime, ke drinkulo sur la insulo ne estas polo sed svedo. En Danlando svedojn faras aĉetaĵojn, precipe alkoholon.

Neatendite, fine de aprilo 1945 okupis la insulon taĉmentoj de sovetia armeo. Rusoj bombardis kaj detruis Ronne kaj Nexø sed neniu el loĝantoj pereis. Antaŭ atako sovetoj disĵetis flugfoliojn informantaj pri atako. Ili okupis la insulon ĝis 1946. En Allinge troviĝas tombejo kun 36 rusaj soldatoj.

Oni opinias, ke bornholmanoj estas idoj de antikvaj Burgundoj kaj Normanoj – Vikingoj. Poste la insulon setliĝis Danoj. La periodo inter IX – XII j. estis tempo de bataloj inter germanaj Danoj kaj slavaj Venedoj.

Anna Ramza

